

ESPERANTO

★ TRIUMFONTA ★

Internacia

SEMAJNA

Neŭtrala

Abono ĉiu pagas laŭ la taga kurzo de sia propra valuto, se eble per ŝtataj monbiletoj en rekomendita letero, aŭ per ĉeko, sed ne per poŝtmandato. — Abonantoj, kies abono estas finiĝinta, ricevas ĝustatempe **admonilon**. — Abonoj povas esti komencataj per iu ajn numero.

Por **Abono** oni sendu laŭvole altan sumon, kaj ni liveros tiom da numeroj, por kiom valoras la pago. — **Prezo de unu numero**: 0.06 dolaro, 0.15 guld., 0.24 sved. kr., 0.50 svis. fr., 0.50 dana aŭ norvega kr., 0.50 peseto, 3½ pencoj, 0.50 fr. a. belg. fr., 0.70 liro, 1.20 fmk., 1.40 ĉ. kr., 4 germ. mk. (por baltaj kaj balkanaj ŝtatoj), 2 germ. mk. (por rusoj), 10 hung. kr., 50 pol. mk., 70 aŭstr. kr.; internacie respond. kupono.

Por adresaĝoj ni kalkulas la prezon de 5 numeroj. — Liston de tiaj **Abonejoj** en diversaj landoj — vidu sur paĝo 41. — Germanoj abonu nur ĉe sia poŝtoficejo (kvaronjare 48 mk.); senpera alsendo sub banderolo — kostas kvaronjare 65 mk.

Montru

tiun ĉi numeron al komercistoj kaj industriistoj!

Traduku

artikolojn el ĝi aŭ resumu ĝian enhavon por la nacia gazetaro!

ELDONANTOJ:
D-ro L. Zamenhof, Warszawa (Varsovio)
W. M. Page, adv., Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gili Norta, Barcelona
Teo Jung, Köln (Kolonia)
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bankdirektoro, Kaunas (Kovno)

REDAKTOROJ:
Ĉef-redaktoro: Teo Jung.
Kun-redaktoro: M. Buijn.
Felietaona red.: Zanoni.


ADMINISTREJO:
Horrem bei Köln, Germ.
Poŝtekkonto Köln 70865, por Teo Jung, Horrem.

ANONCOJ
el ĉiuj landoj 5 germ. mk., po cm², ĉe grandaj aŭ ripetataj anoncoj rabato.

Numero 86 :: Antwerpen, Barcelona, Edinburgh, Kaunas, Köln, Paris, Warszawa :: 28. Majo 1922.

Nacia Ekspozicio Memoriga de la Unua Centjaro de l' Brazila Sendependeco Rio de Janeiro.

Kunpartopreno de ĉiuj landoj.



Enirejo de l' golfeto kaj parto de l' urbo Rio de Janeiro.

En nia lando.

Kiel dolĉege kantas birdetoj,
Sur la branĉetoj,
En la arbar' . . .
Gaje saltante, ĉiam en festo,
Apud la nesto
Flugas nun par'.
Kiom da steloj nokton beligas
Kaj nin ravigas
Ĝis la maten'!
Sun' ekaperas . . . Glore ĝi brilas!
Kampoj similas
Vasta ĝarden' . . .
Tra la verdajo, inter folioj,
La papilioj
Ludas kun ĝoj'.
Venas rivero: ĝi de l' montaro
Al blua maro
Estas la voj'.
Kiom da ĉarmoj, kiom da floroj,
Kaj am' en koroj,
Ĉi tie, nur!
Vi estos ĉiam, kara Patrujo,
La juvelujo
De la Natur'.
J. B. Mello Souza.

Granda Patrujo.

La 16-an de februaro 1907, ĉe la „Washington University Club“, faris Joaquim Nabuco interesan paroladeton patriotan. La simpatia ambasadoro tie montris la sciencajn eblaĵojn de Brazilio. Kaj li memoris pri Alfred Russell Wallace, al kiu „la arbaroj amazonaj prezentas pli ol kvincent specojn de birdoj“. Kaj parolis pri Ludoviko Agassiz, al kiu „la rivero Amazonas prezentis pli da specoj de fiŝoj ol la Atlantiko mem ŝajnas enhavi“. Ankaŭ li ne forgesis Elysée Reclus, kiu, ĉe la Societo de Geografio de Rio de Janeiro, la 18-an de julio 1893, diris tiujn vortojn: „La agrabla impresio, ricevita de

ĉiuj fremduloj alvenantaj la unuan fojon al la enirejo de Rio de Janeiro, estis ankaŭ de mi sentata. — La pintoj krutaj de Gavea kaj Tijuca kaj la montaroj abruptaj, kiuj bordas la golfeton, faras, ke ni nevole demandu, kiamaniere oni povis tie starigi urbon; tamen ia ĝi ekzistas, etendante, kiel polvo, siajn multoblajn brakojn tra valoj, kaj egalvaloras per progreso multajn de la plej gravaj urboj eŭropaj. La sistemo de veturado estas en Rio de Janeiro disvastiĝinta, kiel en neniu alia urbo en la mondo; ĝia temperaturo milda kaj la beleco de ĝiaj pejzaĝoj faras, ke ĝi ne estas superita de la plej belaj ĉefurboj“.

la mortinta brazila ambasadoro certigis, ke Elysée Reclus estis skribinta la plej bonan laŭdon al la brazila naturo. Poste, daŭrigante sian patriotan paroladeton, li diris: „Ni havas la plej kompletan sistemon hidrografian en la mondo, ĉar Brazilio, inter la Atlantika Oceano kaj la okcidentaj riveroj, estas formita de kolosaj insuloj, trairitaj de vastaj akvofluoj, el kiuj multaj ne estas ankoraŭ esploritaj.“

Kaj li diris la veron, kaj la tutan veron, la rimarkinda Pernambukano, kiu tiam estis la ambasadoro de la plej granda lando de Sud-Ameriko ĉe la plej granda lando de Nord-Ameriko.

Ĉu ne estas vero, ke profesoro Gorceix, franca saĝulo, fondinto de la Lernejo de Minoj, en Ouro Preto, mirkonsierniĝis, kiam li vidis, ke la stratoj estas pavimitaj, kaj la muroj konstruitaj per fera gango de unua kvalito, kuŝanta sur la surfaco de la tero je centoj da kilometroj, aŭ formanta montojn altajn je centoj da metroj?

Ĉio ĉe ni estas ankoraŭ nesciata. Ĉar ne estas nur la naturo materia, kiun ni ne konas en Brazilio. Ankaŭ la moralan naturon; la brazilo nur en la nuna tempo individualiĝas; lia tipo ne estas ankoraŭ organizita en la vasta laborejo sudamerika. Ĉi tie, ĉiuj rasoj sin intermiksas, kaŝiĝas, fandiĝas, sin interligas — preparante la neŝanĝeman de granda patrujo, aŭ pli bone, formante en la kampo praktika, la tutan homaron, la tutecon de ĉiuj popoloj en unu sola popolo, kun la samaj sentoj, kun la samaj ideoj, tiamaniere fariĝante popolo ĉiam inspirata de la idealo de la planeda frateco.

Ho, alilandaj estajoj! Rigardu la benatan Brazilion, kaj konstata la veron de miaj diroj. Ĉar al la giganto de la materia naturo tie ĉi ne kontraŭstaras ia pigmeo, sed alia giganto, tiu de la speco sociala, la brazila gento, kie jam ekzistas homoj, kiuj ne timas la komparon kun la plej grandaj en la tutmonda historio, homoj kiel Tiradentes, José Bonifacio, Feijó, Deodoro, Floriano Peixoto, Benjamin Constant, la fondinto de la Respubliko Brazila. — Pero Vaz de Caminha skribis: „La lando estas tre bela . . . Tiamaniere ĝi estas gracia, ke, se ni volos profiti je ĝi, ni rikoltos ĉion, kion ni deziras.“
Moreira Guimarães.

Informoj pri la Eksterlanda Fakoj.

1. Oficiala Parto.

Landoj, kiuj konstruos proprajn pavilonojn (Art. 40 kaj 41 de la Ĝenerala Regularo).

Malfermo kaj fermo de l' Ekspozicio.

La Ekspozicio estos malfermata je la 7-a de septembro 1922 kaj fermata je la 31-a de marto 1923.

Konsisto de l' Ekspozicio.

La Ekspozicio konsistos el la nacia fakoj, por la elmontro de brazilaj produktaj fakoj kaj aferoj, kaj la eksterlandaj fakoj, starigitaj de la oficiala reprezentado de l' nacioj, kiuj volos partopreni ĝin, konstruante specialajn pavilonojn, aŭ ankoraŭ de la personoj loĝantaj en Brazilio, kiuj ricevos de la Aganta Komitato permeson por elmontri eksterlandajn produktajn fakojn.

Loko cedita al la fremdaj nacioj.

Al la registaroj, kiuj jam peis la fiksigon de la loko, kie ili intencas konstrui siajn pavilonojn, la Aganta Komitato pruntecedis lokon neniam malsuperan je 20x10 m., tio estas 200 m².

Lokigo de la areo destinita al la eksterlandaj pavilonoj.

Por lokigi la oficialajn eksterlandajn pavilonojn, la Aganta Komitato destinas la Avenon de l' Nacioj, kies enirejo staras ĉe la Avenuo Rio Branco, kontraŭ la Palaco Monroë.

Al la grandaj industrioj (mulpepezaj maŝinoj, k. c.), pruntecedos la Aganta Komitato la spacon necesan por la komplemento de ilia ekspozicio, en la liberaj terspacoj de la Havena Kajo.

Nur rajtos tiun cedon la landoj, kiuj posedos pavilonojn en la ĉefa loko de la Ekspozicio. La Komitato rezervas al si la rajton apliki sur iliaj elmontoj, konsiderataj kiel aneksaj, la necesan kontrolon, laŭ la Ĝenerala Regularo, tamen senigante sin de la respondecoj kaj taskoj rilataj al la transportoj, gardo, asekuro kaj redono de la komercaĵoj. La planoj de tiuj pavilonoj devos esti submetataj al la aprobo de la Aganta Komitato.


Projektoj kaj planoj.

La projektoj kaj planoj de iuj ajn eksterlandaj pavilonoj starigotaj en la speciala loko destinita

en la Ekspoziciejo, devos esti prezentataj al la aprobo de la Aganta Komitato.

Ekspoziciantoj loĝantaj en eksterlando.

La ekspoziciantoj loĝantaj en eksterlando nur povos elmontri la produktajn fakojn de siaj nacioj kaj devos sin turni rekte al la oficialaj reprezentantoj de siaj landoj.




Placo Maršalo Floriano, kie staras la Urba Teatro.

La sendado de iliaj produktaj fakoj estos same farata pere de tiuj reprezentantoj, al kiuj la Komitato sendos la modelojn por la enskriba kaj ekspeda bulnetoj.

La eksterlandaj registaroj devos premi sur sin la plenan respondecon pri ĉiuj elspezoj de transporto, ekspedo kaj konsigno kaj ankaŭ tiuj de pakado, depone, kosto kaj iloj por ties malfermo, tabloj, vitro-ŝrankoj, sidloj kaj ceteraj objektoj necesaj al siaj instalaĵoj.

Konstruo de l' pavilonoj.

Ĉiuj konstruaj rilataj al la eksterlandaj ekspoziciantoj estos sub la respondeco de la interesatoj, kiuj ankaŭ prenos sur sin tion, kio estos necesa fari por la instalo de mulpepezaj maŝinoj, k. c., kaj same la instalaĵoj kaj livero de elektra energio, gaso, akvo, ktp., kiujn, eble, ili necesos. La koncernantaj projektoj devos esti antaŭe submetitaj al la aprobo de la Aganta Komitato.



Nacia Muzeo.

La Industrio kaj Komercio de la Tutmondo renkontiĝos en la Centjar-Ekspozicio Rio de Janeiro 7. Septembro 1922 ĝis 31. Marto 1923.

Petoj pri akcepto.

La fabrikoj kaj firmoj starigitaj en la landoj, kiuj oficiale partoprenos en la Ekspozicio, sendos al la oficialaj reprezentantoj de tiuj landoj peton pri akcepto, laŭ la modelo elektita (Mod. n-o 1). La akcepto aŭ malakcepto de ekspoziciantoj en la eksterlandaj pavilonoj estos decidata rekte de la oficialaj reprezentantoj de tiuj landoj, konforme al la Ĝenerala Regularo de la Ekspozicio.

Enskribaj Bultenoj.

La ekspoziciantoj, kiuj estos akceptitaj, laŭ la kondiĉoj de la antaŭa paragrafo, plenigos enskriban bultenon, en tri kopioj, laŭ la modelo elektita (Mod. n-o 2), kiujn ili sendos al la oficialaj reprezentantoj de siaj landoj.

Tiuj bultenoj estos liverataj de la eksterlandaj reprezentantoj al la Oficejo de la Aganta Komitato, kie ĉiu ekspozicianto ricevos enskriban numeron. Unu el la kopioj de l' enskriba bulteno estos konservata en tiu Oficejo kaj la ceteraj redonataj al la interesatoj kun la noto pri la matrikulo de l' ekspozicianto.

Ekspedo de la pakajoj destinitaj al la Ekspozicio.

La pakajoj venontaj de eksterlando kaj destinitaj al la Ekspozicio kunportos ekspedan folion, laŭ la modelo elektita (Mod. n-o 3).

Tiu ĉi folio, farita en tri kopioj, enhavos liston de la objektoj entenataj en ĉiu pakajo, ties pezon kaj valoron kaj ankaŭ la numeron de la ekspozicianto, se lia enskribo jam estos farita.

El la tri kopioj de tiu folio unu estos sendata de la eksterlandaj korespondantoj al la Aganta Komitato, la dua akompanos la ekspedon, kiel pruvan dokumenton por la havigo de la dogana senimposteco, kaj la tria estos konservata de la ekspozicianto, kiel posedpruvo, por ke li povu rehavigi siajn objektojn, post la fermo de la Ekspozicio.

Forporto de la malplenaj kestoj.

La malplenaj kestoj, tuj kiam estos eliritaj la objektoj, kiujn ili enhavis, estos tuj forportigitaj de la reprezentantoj de la eksterlandaj registaroj. Se tio ne okazos, la Komitato ilin transportigos al speciala deponejo, sed la elspezoj kaj la risiko estos de la ekspoziciantoj. La malplenaj kestoj neforportitaj de la deponejo dum unu monato post la fermo de la Ekspozicio estos konsiderataj kiel forlasitaj de la ekspoziciantoj, kiuj, tiukaze, ne rajtos plu lan ajn plendon.

Transporto de la pakajoj ĝis la Ekspoziciejo.


Por faciligi la aferon kaj interese de la eksterlandaj ekspoziciantoj, estos organizata, oportune, per antaŭe fiksitaj tarifoj, speciala servo de transporto de la objektoj de la vaporsipoj ĝis la ricevejoj aŭ la lokoj al ili destinitaj en la ekspoziciejo.

Dogana senimposteco.

(Enspeza budĝeto por 1922, art. 53.)

La importado de materialoj, komercaĵoj aŭ objektoj destinitaj al la Ekspozicio Memoriga de la Centjara Datreveno de l' Sendependeco obeas al la jenaj reguloj:

1. Ĉiu pakajo surhavas surskribeton kun la vortoj: „Exposição Brasileira“, kiel ankaŭ la nomon de la importonto.
2. En la Ekspoziciejo, kiu estos konsiderata kiel dogana deponejo, estos farata la ekzameno de la pakajoj kaj la kontrolo de ilia enhavo.
3. La malfermo de la pakajoj nur povos esti farata kun la ĉeesto de la doganoficistoj komisiitaj por ilin kontroli.
4. Post la kontrolo de la objektoj kaj la kalkulo de la doganimpostoj, estos farata raporto, en du kopioj, subskribota de la doganoficisto kaj de la persono, kiu havos la respondecon de la objektoj en la daŭro de la Ekspozicio.



Enirejo de golfeto Rio de Janeiro kaj la kvartalo „Botafogo“.

5. Ĉiuj objektoj, komercaĵoj, aŭ produktaĵoj ekspoziciotaj, kiel ankaŭ la materialoj por konstruado kaj ornamaranĝo de la pavilonoj, la meblaroj, vitroŝrankoj kaj ĉio, kio estos necesa por tiuj celoj, ne pagos la doganimpostojn kaj ĉiujn flankajn elspezojn kaj tiujn nomatajn de „Konsumado“.

6. Ĉiuj objektoj, kiuj ne estos reeksportitaj post la fermo de la Ekspozicio en limtempo fiksita de la Aganta Komitato, estos devigataj pagi ĉiujn doganimpostojn, laŭ la raporto farita post la kontrolo.

7. Estos liberigitaj de tiuj impostoj:

- a) la objektoj, kiuj estos donacataj al oficialaj publikaj institucioj aŭ al unuagradaj aŭ superaj instruejoj de la Respubliko;
- b) la materialoj por la konstruado de l' pavilonoj, kiam tiuj ĉi fariĝos posedado de la Unuiĝo aŭ de la Distrikto Federala aŭ ankoraŭ se ili estos donacataj al bonfaraj aŭ edukaj institucioj;
- c) la objektoj aŭ komercaĵoj, kiuj, por sia naturo aŭ kvalito, difektigos dum la Ekspozicio, kiam tio estos konstatata de la Komitato;
- d) la objektoj aŭ komercaĵoj destinitaj al reklamo, se ili estos disdonataj senpage al la vizitantoj de la Ekspozicio.

8. Estos devigataj pagi la impostojn, laŭ la raporto antaŭe farita, la objektoj aŭ komercaĵoj, prezentantaj defektiĝon, eĉ gravan, se ili estos vendataj.

9. La konsulaj fakturoj de la objektoj destinitaj al la Ekspozicio estos liverataj senpage.

Formalajoj plenumotaj de la eksterlandaj ekspoziciantoj.

Ĉiu eksterlanda industriisto, kiu deziras partopreni en la Ekspozicio, devos plenumi la jenajn formalajojn:

1. Fari peton pri enskribo (Mod. n-o 1), en tri kopioj;
 2. Plenigi la enskriban bultenon (Mod. n-o 2), en tri kopioj;
 3. Plenigi la ekspedan folion (Mod. n-o 3), en tri kopioj.
- Ĉiujn tiujn kopiojn li devos sendi al la oficiala reprezentanto de sia lando.
4. Marki ĉiujn pakajojn per la surskribo „Exposição Brasileira — Rio de Janeiro“ kaj surmeti sur ilin la nomon de la importonto aŭ tiun de la ricevonto en Rio.
 5. Akorde agi kun la reprezentanto de sia lando pri la sendado de tiuj pakajoj al Rio de Janeiro (ĝusta tempo por enŝipigo, konsulaj fakturoj, k. c.).
- La produktaĵoj de eksterlanda deveno nur povos esti elmontrataj ekster tiuj pavilonoj kun la permeso de la reprezentanto de sia lando.

II.

Neoficiala parto.

Elmontrado de eksterlandaj produktaĵoj ekster la Oficialaj Pavilonoj. (Art. 45 de la Ĝenerala Regularo.)

Antaŭa noto.

Kiel ni diris en la oficiala parto, la eksterlandaj produktaĵoj de la nacioj, kiuj estos konstruitaj proprajn pavilonojn en la Ekspoziciejo, nur povos esti elmontrataj ekster tiuj pavilonoj kun permeso de la oficialaj reprezentantoj de sia lando.

La ekspoziciantoj de tiuj produktaĵoj devos unue havigi al si la necesan permeson, por ke ili povu esti akceptataj, laŭ la sekvantaj kondiĉoj:

Enskribo de la ekspoziciantoj.

La ekspoziciantoj loĝantaj eksterlande povos elmontri siajn produktaĵojn pere de sia agento loĝanta en Brazilio, kaj la personoj loĝantaj en Brazilio povos elmontri eksterlandajn produktaĵojn en specialaj lokoj fiksita de la Aganta Komitato, dum estos disponebla terspaco.

Tiuj ekspoziciantoj pagos fiksan enskriban imposton de 100 milrejsoj.

Tiu ĉi imposto estas ŝuldata de ĉiu firmo aŭ fabrikisto eksterlanda, eĉ se la sama persono estos reprezentanto de diversaj firmoj aŭ fabrikoj.

Luado de la terspacoj.

Tiuj ekspoziciantoj pagos luimposton kalkulitan po unuo da areo, laŭ la jena tarifoj:

Spaco por pavilonoj:	
de 3m x 4m aŭ 12 m ²	500 milrejsoj
de 3m x 5m aŭ 15m ²	600 „
de aliaj dimensioj, por areoj mezurantaj minimume 6m ² , po m ²	45 „
Spacoj ekster la konstruaĵoj (minimume 5m ²)	30 „

La pago de la luado estos farata per unu sola fojo kaj okaze de la definitiva akcepto de ĉiu ekspozicianto.

Projektoj kaj planoj.

La ekspoziciantoj, kiuj deziras konstrui pavilonojn, prezentos al la Aganta Komitato kompletan planon, kiu devos esti zorge kolordesegnita kaj enhavos ĉiujn detalojn kaj prezprojekton.

Konstruo de l' pavilonoj.

Forporto de la malplenaj kestoj. Transporto de la pakajoj ĝis la Ekspoziciejo. Dogana senimposteco.

Estas aplikataj la samaj reguloj de la oficiala parto.

Forporto de la pavilonoj.

La ekspoziciantoj estas devigataj fari la mal-konstruon de la pavilonoj, konforme al la instrukcioj donataj de la Aganta Komitato.

Lumigado.

La Ekspoziciantoj prenos sur sin la pagon de ĉiuj elspezoj necesaj por la instalo kaj uzado de la lumo por lumigi siajn instalaĵojn.

III.

Specialaj Oficialaj Ekspozicioj okazontaj kune kun la Nacia Ekspozicio.

Belartoj.

Tiu ekspozicio konsistos el du apartaj fakoj, unu destinita al la arta kaj historia retrospektivo pri ĉiu religia, civila kaj milita, plastika kaj vesta artoj kaj la alia destinita al la nuntempa arto. Tiu ekspozicioj estos direktataj de Profeso-ro Baptista da Costa, Direktoro de „Escola Nacional de Bellas Artes, Avenida Rio Branco, Rio de Janeiro“, al kiu ĉiuj interesatoj povos rekte sin turni.

Kvara Brutara Ekspoziciejo.


La Kvara Nacia Brutara Ekspoziciejo okupos la dependaĵojn de l' „Serviço de Industria Pastoral“, strato Matta Machado, Rio de Janeiro. Ĝi havas specialajn regularon kaj programon.

Petu informojn al D-ro Alcides Miranda, Ĝenerala Direktoro de la „Associação Pastoral“, laŭ supra adreso.


Grava noto.

La personoj loĝantaj en eksterlando, kiuj deziras partopreni la Ekspozicion en la Oficialaj Pavilonoj, devas peti de la Oficiala Reprezentanto de sia lando aŭ de la Brazilaj Konsulejoj la modelojn elektitajn por la akcepto kaj la enskribo de la ekspoziciantoj (Mod. n-o 1 kaj 2) kaj por la ekspedo de la produktaĵoj (Mod. n-o 3). Ĉiu modelo devos esti plenigita en tri kopioj.

Ĉiu, kiu deziras pliajn informojn rilatajn al la Oficiala Parto, petu ilin de s-o inĝ. Alfredo C. Niemeyer — Bibliotheca Nacional, Avenida Rio Branco, Rio de Janeiro. **Telegr. adreso:** „Brasinarío“.



Centra Policejo.




Instituto de Surdmutuloj.

Kion importas Brazilio?

- I-a klaso: Bredbestoj.
- II-a klaso: Krudmaterialoj kaj duonpretaj artikloj.
- III-a klaso: Pretaj artikloj ĝenerale.
- IV-a klaso: Specialaĵoj de la nutra branĉo.

Ĉiuj Nacioj de la Tutmondo estas invitataj partopreni en la Centjar-Ekspozicio Rio de Janeiro 7. Septembro 1922 ĝis 31. Marto 1923.



Preĝejo de nia Sinjorino de la Gloro.

Kongresoj okazontaj dum la Centjartesto.

A. Oficialaj.

- Jura Kongreso (1.—15. aŭgusto).
- Internacia Kongreso de Amerikanistoj (20.—30. aŭgusto).
- Brazila Kongreso de Protekto al la Infanaro kaj Sudamerika Kongreso de l' Infano (27. aŭgusto ĝis 5. septembro).
- Internacia Kongreso de Amerika Historio (7.—20. septembro).
- Brazila Kongreso de Supera Instruado (1.—25. septembro).
- Sudamerika Fervoja Kongreso kaj Internacia Kongreso de Inĝenierarto (15.—20. septembro).

B. Ekonomiaj.

- Kongreso de Karbo.
- Kongreso de Ĥemio.
- Kongreso de Terkulturo kaj Brut edukado.
- Kongreso de Laktvendejoj.
- Kongreso de Komercaj Asocioj.
- Kongreso de Socia Ekonomio kaj diversaj aliaj.
- Sudamerika Fervoja Kongreso.**

Tiu kongreso celas studi la solvojn, kiuj povas interesi la konstruadon, la konservadon kaj la trafikon de la sudamerikaj fervojoj, el kiuj kelkaj baldaŭ sin renkontos ĉe la limoj de la sudamerikaj landoj.

La unua kongreso kunvenis en Buenos Aires, en 1910, kaj ĝin partoprenis preskaŭ ĉiuj registaroj de la sudamerikaj landoj kaj la ĉefaj fervojoj kompanioj de tiuj landoj.

La dua kunveno en Rio de Janeiro, de 15. ĝis 20. septembro proksima, kaj ĝin ĉeestos pli

ol ducent reprezentantoj, kiuj diskutos la tezojn jam formulitajn en Buenos Aires.

Internacia Kongreso de Inĝenierarto.

Tiu kongreso estas kunvokita lasttempe kaj pritraktos pri la akvofaloj, elektrigo de la fervojoj, karba produktado, siderurgio, kc. kc.

La interesatoj sin turnu al „Club de Engenharia“, Avenida Rio Branco, Rio de Janeiro.

XX-a Internacia Kongreso de Amerikanistoj.

Tiu kongreso pritraktos pri la jenaj sciencaj branĉoj: antropologio, etnologio, arkeologio, geologio, paleontologio kaj historio de la Amerika Kontinento.

Komencante siajn kunvenojn en la jaro 1875 en urbo Nancy kaj ilin alternante, ĉiudujare, en aliaj urboj de l' amerika kaj eŭropa kontinento, ĝi starigis, dum la kunveno okazinta en Parizo (1900), sian definitivan regularon, kiu gvidis la postajn kunvenojn. La plej famaj eminentuloj pri amerikanismo sin okupis pri la laboroj de tiuj kunvenoj kaj zorge konservas en siaj bibliotekoj la respektivajn publikaĵojn.

La XX-a Kongreso okazos en Rio de Janeiro, (20.—30. aŭgusto 1922), en la epoko de la Memorigo de la Centjaro de l' Brazila Sendependeco kaj sub la aŭspicioj de diversaj sciencaj institucioj kaj famaj intelektuloj.

La membrokartoj kostas 1 sterl. pd. aŭ 5 dol. Ĉiu enskribinto rajtas ricevi la kongresajn dokumentojn, distingilon kaj medalon kaj partopreni en la lastaga festeno.

Adreso: „XX. Congreso Internacional de Americanistas, Praça 15 de Novembro, Rio de Janeiro, Brazilio“.

Geografio de Brazilio.

Situacio.

Brazilio okupas la centran kaj la orientan parton de Suda Ameriko. En la plej granda etendo (ĝis la urbo S. Paulo) ĝi kuŝas en la intertropika zono kaj malgrandparte en la suda modera zono. Ĝi estas enhavata preskaŭ tuta en la suda duonsfero de la terglobo kaj apenaŭ malgrandparte en la norda duonsfero.

Latitudo.

N. 5° 10' kaj S. 33° 46' 10".

Longitudo.

(Greenwich). Okcidente 73° 47' 31" kaj Oriente 34° 48' 58".

Dimensioj.

Brazilio havas de Nordo al Sudo 4307 kilometrojn kaj de Oriento al Okcidento 4386 kilometrojn.

Areo.

La areo de Brazilio estas ĉirkaŭ je 8525000 kvadrataj kilometroj. Ĝi estas la plej granda lando en Suda Ameriko kaj la kvina en la mondo laŭ ĝia areo.

Absoluta loĝantaro.

Oni kalkulas la nunan loĝantaron je pli ol 30 000 000 da loĝantoj.

Rilata loĝantaro.

Rilate al sia grandega teritorio Brazilio estas ankoraŭ tre malmulte loĝatigita; facile oni vidas,

ke ĝi havas iom malpli ol 4 loĝantojn po kvadrata kilometro.

Lingvo.

La lingvo oficiala kaj parolata de la tuta loĝantaro estas la portugala, iom modifita de la klimato kaj de la medio.

Religioj.

La ŝtato ne havas oficialan religion, donas plenan liberecon de penso kaj konsideras tute egalaj la diversajn sektojn. Tamen la plimulto de la braziloj sekvas la katolikan apostolan roman religion.

Registaro.

Brazilio estas Federacia Respubliko, konsistanta el 20 ŝtatoj, unu Federala Distrikto kaj unu Teritorio, sub la direkto de Prezidanto helpata de sep Ministroj.

Marbordo.

La marbordo de Brazilio estas longa 7920 kilometrojn. La ĉefaj havenoj estas Rio de Janeiro, Santos, S. Salvador, Recife, Belem kaj Rio Grande.

Insuloj.

Brazilio havas multajn insulojn, el kiuj la plej vasta estas „Marajó“, pli granda ol Svisujo.

Orografio.

Brazilio estas ĝenerale montplena, escepte en la norda parto, kiu estas ebena. La plej altaj pintoj estas Bandeira (2950 metroj) kaj Agulhas Negras (2809 metroj).

Riveroj.

Brazilio posedas la plej grandan riveron en la mondo, laŭ la akvokvanto, nomatan Amazonas. Ĝia kuro estas longa 5571 kilometrojn, el kiuj 3500 km. ŝipireblaj, kaj ĝia areo estas kalkulata je 6 430 000 km². Ĝi havas pli ol mil enfluantojn, el kiuj kelkaj estas pli longaj ol Danubo. Aliaj riveroj ŝipireblaj trakuras la brazilan teritorion, el kiuj ni citas la jenajn: S. Francisco, Parahyba, Itapicurú, Parahyba do Norte, Paraguassú, Belmonte, Uruguay, Paraguay, Parahyba do Sul kaj Doce. En Brazilio estas multaj akvofaloj, kiuj povas naski fortegan energion. La ĉefa estas nomata „Sete Quedas“ (Sep Faloj), kiu povas naski motoran forton je 20 000 000 H.P., kaj estas la plej rimarkinda en la mondo, laŭ la akvokvanto. La bruegdon de tiu akvofalo oni aŭdas ĝis 33 km. de distanco. Ĉiusekunde falas 18 000 kubaj metroj da akvo. Estas ankaŭ tre rimarkinda la akvofalo „Paulo Afonso“, kiu estas alta 80 metrojn kaj povas naski forton je 2 000 000 H.P.

Urboj.

La ĉefaj urboj kaj ilia loĝantaro estas: Rio de Janeiro (ĉefurbo): 1 200 000; S. Paulo (ŝtato S. Paulo): 450 000; Bahia (ŝt. Bahia): 350 000; Belem (ŝt. Pará): 275 000; Recife (ŝt. Pernambuco): 250 000.

Estas ankoraŭ 165 urboj kun pli ol 30 000 loĝantoj kaj multaj aliaj malpli grandaj.

Klimato.

La klimato de Brazilio estas dolĉigata de la trado (senŝanĝa vento). En ĝi troviĝas, tamen, preskaŭ ĉiuj klimatoj de la terglobo, kvankam la temperaturo neniam atingas la maksimumon de Afriko nek la minimumon de Eŭropo.

Pri la sanigejo Brazilio estas lando vere privilegiata; laŭ fremda scienculo, Brazilio estas unu el la plej sanigaj landoj en la mondo, kaj ĝi estas rilate al la du Amerikoj kiel Italujo al Eŭropo.

Komunikvojoj.

Brazilio havas 30 000 km. da fervojoj; krom tio oni konstruas kaj pristudas ankoraŭ multajn aliajn.

Faciligas la komunikojn multaj kilometroj da veturiloj kaj la granda nombro da riveroj.

Telegrafo.

La lastan jaron la longeco de la Nacia Telefona reto estis ĉirkaŭ 80 000 km. Tiu ne enkalkulas la telegrafon de la fervojoj kaj de fremdaj entreprenoj.

Produktadoj.

En tiu ajn natura regno Brazilio ne povas esti komparata kun alia lando en la mondo. Tiel, en la minerala regno, ĝi havas oron, feron, hidrargon, stanon, platenon, bismuton, sulfuron, argilojn, paladion, torfon, arĝenton, kupron, aluminon kaj multajn aliajn mineralojn, precipe gemojn. Rimarkindaj estas la diamantoj. La vegetala regno estas riĉega: ekzistas nekalkulebla kvanto da utilaj kreskaĵoj: kuracaj, konstruaj ktp.

La bestoj estas nek tiel grandaj nek tiel kruelaj, kiel tiuj de la malnova kontinento.

Instruado.

La instruado konsistas el tri gradoj: elementa, duagrada kaj supera. En la ĉefurbo de Brazilio estas grava Universitato.

Industrio.

Tre progresas la Brazila industrio en siaj diversaj branĉoj.



D-ro Epitacio Pessoa, Prezidanto de la Brazila Respubliko.

Terkulturo.


Ĝi estas la ĉefa riĉaĵo de Brazilio. Ni montros la plej rimarkindajn produktojn kaj iliajn ciferojn, pli malpli, rilate al la terkultura jaro 1920—1921:

Milkilogramoj.

Maizo	4 736 096
Kafo	854 724
Sukero	695 516
Fazeolo	644 444
Rizo	638 264
Manihota faruno	872 308
Mateo	260 000
Kotono	242 996
Terpomoj	190 853
Greno	135 845
Tabako	86 633
Kakao	61 052
Kaĉĉuko	60 859
Kokoso	39 035
Sekalo	19 605

Eksterlanda Komerco 1921.

Bestoj kaj iliaj produktaĵoj	Milkilogr.
Ekspordado.	139 530
Mineraloj kaj iliaj produktaĵoj	277 044
Vegetaĵoj kaj iliaj produktaĵoj	1 502 847
Sumo	1 919 421
Importado.	2 578 236



Avenuo Rio Branco, kie oni vidas la sidejon de „Jornal do Commercio“ (Jurnalo de l' Komerco), la plej grava jurnalo de Brazilio (fondita en 1827).



Panoramo de Rio de Janeiro, vidata de la supro de l' monto „Pão de Açúcar“ (Sukerpano).

Kion eksportas Brazilio?

Kotono, Rizo, Sukero, Grasoj, Kaĉĉuko, Kakao, Carnaúba-Vakso, Konsekvita Viando, Glaciigita Viando, Kaŝtanoj, Ledo, Mandioka-Faruno, Faboj, Delikataj Fruktoj, Oleo-fruktoj, Tabako, Maté, Lano, Konstruligno, Mangano, Miza, Maizo, Diversaj Oleoj, Oro, Feloj, Sebo, Tassao (salumita kaj sekigita viando).

Historio de Brazilio.

La 9-an de marto 1500 ekveturis de Portugalujo, laŭ ordono de reĝo D. Manuel — la Sortfavorita —, ŝiparo konsistanta el 13 karaveloj, celante Hindujon, kiu tiam apartenis al la portugala reĝlando. Ĝia komandanto estis admiralo Pedro Alvares Cabral. Ĉu por eviti la senvencon de la afrikaj bordoj, ĉu pro tio, ke la admiralo konjektis, post la eltrovo de Ameriko, ke li renkontos teron ĉe la suda parto de la Atlantika Oceano, aŭ la trovon de vojo al Hindujo tra l' Okcidento, la admiralo deklariĝis de la vojo ĝis tiam laŭirita.

La 22-an de aprilo de 1500 Cabral ekvidis monteton, kiun li nomis „Paschoal“, pro tio, ke tiu tago estis dimanĉo de la kristana pasko. Sajnigis al li, ke la ĵus eltrovita tero estas insulo, kaj ĝin nomis „Vera-Cruz“ (Vera-Kruco).

Ricevinte la informon pri la eltrovo de nova lando, D. Manuel, la 22-an de majo 1501, sendis ekspedicion por esplori ĝin kaj scii pri ĝia amplekso kaj riĉeco. La jaron 1503 ekveturis nova ekspedicio, post kiam estis fondata la faktorio „Santa Cruz“ (Sankta Kruco), kiu estis la dua nomo de la eltrovita lando. La tria, kaj definitiva nomo de la lando, estas „Brasil“ (ankaŭ skribata „Brazil“). Tiu ĉi nomo devenas de la granda kvanto de valora ligno prezentanta la koloron de karbardoj, kaj multe uzata de la tinkturistoj.

La famo pri la nova lando kaj ĝiaj riĉaĵoj aliris la avidecon de alilandanoj; kaj por eviti, ke ili forprenu la lignojn kaj aliajn produktojn de la riĉa lando, D. João III-a reĝo de Portugalujo kaj heredinto de D. Manuel, ordonis, ke Christovam Jacques iru kun konvena ŝiparo por defendi la brazilan marbordon. Li fondis la fortikajeton Itamaracá en Pernambuco por malhelpi la elŝipiĝon de la francoj, kiuj tre ofte vizitadis tiun lokon. Sed la vasteco de la lando montris la neefikon de la defendo, pro tio D. João III-a decidis fondi vastan kolonion, kaj li nomis en 1531 Martim Affonso de Souza por tia celo. Tiam estis fondata la unua kolonio, nomata „S. Vicente“, ĉe la marbordo; poste li fondis en la enlando duan kolonion, kiun li nomis „Pirantininga“.

La ideo ne bone efektiviĝis pro la malfacileco trovi kolonianojn. Pro tio, D. João III-a dividis Brazilion en regionoj, kiujn li nomis „Capitania“ (Kapitanlando). Tiuj regionoj leĝe fariĝis propraĵo de la personoj, al kiuj ili estis donacitaj. Tiamaniere estis fondataj 12 „capitanias“.

Ne ĉiuj prosperis, sed kelkaj estas la origino de nunaj brazilaj ŝtatoj.

D. João III-a tre baldaŭ komprenis, ke la divido de Brazilio laŭ „capitanias“ ne alportos praktikan rezulton, pro tio, ke la donacitoj ne posedis financajn elementojn kaj aliajn.

Li starigis, do, la sistemon de Generala Regado, kies sidejo estis S. Salvador, la unua urbo fondita en la nova lando. La unua reganto ĝenerala estis Thomé de Souza. Postvenis Duarte da Costa kaj Mem de Sá, kiu fondis la unuan urbon Rio de Janeiro, je la 20-a de januaro 1567.

La progresoj de la nova lando konsilis al la nova reĝo D. Sebastião la dividon de la administracio de Brazilio; sed tia divido ne bone sukcesis. Tamen la portugala kolonio nature, kvankam malfacile, prosperadis.

Sekve de la morto de D. Sebastião, reĝo de Portugalujo, en Alcacer-Kibir (Afriko), en 1578, estis akklamita reĝo Felipe II-a de Hispanujo, ĉar li postulis la rajtojn al li apartenantajn pro sia naskiĝo.

Fariĝinte hispana kolonio, Brazilio devis elporti la atakojn de la malamikoj de Hispanujo, precipe de la nederlandoj. Tiuj ĉi fondis komercan societeton, kies ĉefa celo estis la almiĝo kaj ekspluato de la nova lando, kaj la unua konkero estis la urbo S. Salvador, la ĉefa urbo de la kolonio. Ne longe restis tie la nederlandanoj; sed ili ne malkuraĝiĝis, kaj nova ekspedicio atakis kaj okupis parton de la nuna ŝtato Pernambuco. La sinsekvaj militakiraĵoj de la nederlandoj devigis Hispanujon uzi efikajn rimedojn por definitiva forpelo de la invadintoj, sed la sukceso ne venis.


La 1-an de decembro 1640, Portugalujo ribelis kontraŭ Hispanujo kaj sin liberigis de la fremda jugo. Tiamaniere Brazilio fariĝis denove portugala kolonio, kaj Nederlando kaj Portugalujo faris aliancon, kiu ne longe daŭris. Fine, la 16-an de aŭgusto 1661 la du regnoj subskribis pacan kontrakton, per kiu Nederlando cedis al Portugalujo ĉiujn almiĝitojn kaj rajtojn. La rego nederlanda daŭris 24 jarojn.

La defendo de la nova lando ne estis farata nur de la portugaloj; unuflanke, la indiĝenoj duone civilizitaj de la portugaloj; aliflanke, la naskiĝintoj de la raskunmikso de la kolonianoj kun la indiĝenoj kaj kun la nigruloj sklavigintaj, kreis novan tipon homan, kiu kun la portugaloj puraj formas la bazon etnologian de Brazilio.

Jam ekintensiĝis la influo de la unuaj braziloj. La lukto inter kolonianoj kaj la enlandanoj ekfariĝis pli evidenta kaj eksplodis serioze pro la eltrovo de orminejoj en la nuna ŝtato Minas Geraes.

De longe la limoj inter Portugalujo kaj Hispanujo ĉe Rio de Prata estis diskutataj.


En 1710, la francoj revenis por ataki la urbon Rio de Janeiro, sed ili ne sukcesis ĝin okupi.



BILDOJ PRI ADMIRINDA RIO DE JANEIRO.

Meze:

Palaco Guanabara, kie gastis Alberto I-a reĝo de la belgoj.



Supre.
Maldekstre:
Monto
„Pão
de Assucar“
(Sukerpano).

Dekstre:
Marborda
Avenuo
kaj kvartalo
„Gloria“.

Malsupre.
Maldekstre:
Hotelo
„Avenida“

Dekstre:
Sidejo
de ĵurnalo
„Correio
da Manhã“



La esploro de la nova lando fariĝis pli kaj pli intensa, precipe en la nunaj ŝtatoj S. Paulo, Minas Geraes kaj Goyaz, kaj pro ĉi tiu riĉeco la reĝo dismembriĝis ilian regadon, kreante tri „capitanias“.

En 1788, Portugalujo dekretis la liberigon de la indiĝenoj sklavigitaj de la kolonianoj.

La progreso de la nova lando plialtiĝis tom post iom kaj devigis la aliformigon de kolonio en vic-regolando, kio okazis en 1763. Rio de Janeiro de tiam fariĝis la ĉefurbo de Brazilio.

La ekskolonio daŭris kiel vic-regolando ĝis 1808, kiam pro la alveno de D. João VI-a, reĝo de Portugalujo, ĝi fariĝis reĝlando.

La transloĝiĝo de la reĝa familio portugala al Brazilio estis la rezultado de la Napoleona politiko. La franca imperiestro estis ordoninta la „kontinentan blokadon“ kontraŭ Anglujo. Ĉar Portugalujo ne partoprenis en ĝia plenumo, Napoleono invadis kaj almiĝis la malgrandan reĝlandon. D. João VI-a komprenis tre bone la danĝeron, kiu minacis sian reĝlandon, kaj forkuris al Brazilio, kiu profitis el tiu vizito. La unua paŝo estis la malfermo de la brazilaj havenoj al la komerco de la nacioj amikaj. D. João VI-a elektis Rio de Janeiro kiel sidejon de la monarĥio. La progresoj de Brazilio de tiam pligrandiĝis tiamaniere, ke D. João VI-a decidis altiĝi ĝin al la rango de reĝlando. Tiel naskiĝis la

Unuiginta Reĝlando de Brazilio, Portugalujo kaj Algarves.

Al la portugaloj ne plaĉis la enestado de D. João VI-a en Brazilio, ĉar tiam la vera ĉefurbo de Portugalujo estis Rio de Janeiro, kaj la malnova reĝlando estis kvazaŭ kolonio de Brazilio. Kiel protesto kontraŭ la malaltiĝo de la politika rango de Portugalujo okazis revolucio, kiu devigis D. João VI-an reveni Portugalujon kaj lasi kiel reganton sian filon, princon D. Pedro. En 1821, estis solene akceptata la nova konstitucio portugala, al kiu la princo estis devigata akcepti ankaŭ, ne sen lukto inter portugaloj kaj braziloj. Tuj poste dekreto devenanta de la portugala registaro deklaris sendependajn ĉiujn provincojn brazilajn, kun la nura obo al la portugala registaro. Tiamaniere sole la „capitania“ de Rio de Janeiro devis obedi al la princo. Tuj poste la princo ricevis ordonon, por ke li revenu Eŭropon por perfektigi sian edukon. Tiaj decidoj de la portugala registaro celis evidente revenigi Brazilion al la rango de kolonio. Tion la braziloj komprenis, kaj protestis kontraŭ la foriro de la princo. D. Pedro ankaŭ komprenis, ke de la tago, kiam li forlasos la landon, Brazilio proklamos sian sendependecon. Pro tio, kiam li ricevis petkskribon pri lia restado en Brazilio, li respondis: „Ĉar tio estas por la bono de ĉiuj kaj por la ĝenerala feliĉo de la nacio, diru al la popolo, ke mi restas.“ Poste li dekretis, ke la ain ordono, veninta de Lisbono, ne estu plenumata sen lia aprobo. Nekaŝita ribelo, kiu finiĝis per radikala ŝanĝo politika.

La 7-an de septembro 1822, dum D. Pedro revenis de sia vojaĝo al S. Paulo, ĉe la bordo de la rivereto Ypiranga, li ricevis la korespondajojn de Portugalujo, el kiuj unu nuligis ĉiujn liajn ordonojn. Post mallonga meditado li demetis sian ĉapelon kaj kriis forte kaj decide:

„Sendependeco aŭ Morto!“

La 12-an de oktobro de tiu sama jaro li estis akklamata Konstitucia Imperiestro de Brazilio, kaj uzis la nomon Pedro I-a.

Ne nur sendependecon volis la brazilanoj, sed ankaŭ alian reĝimon. La konstantaj konfliktoj inter portugaloj kaj braziloj naskis tiun ideon, kaj D. Pedro I-a, sentante sin nekapabla kviesti la nacion, decidis abdikii, kaj D. Pedro de Alcantara, lia filo, estis de li nomata imperiestro de Brazilio. Ĉar li estis ankoraŭ infano, estis necese, ke la Imperia Kongreso nomu reganton, kiu regis Brazilion, ĝis kiam D. Pedro de Alcantara atingis stan 11-an jaron. Tiam la Kongreso decidis, ke li jam estas plenaĝa, kaj li komencis sian reĝecon sub la nomo de Pedro II-a.

Post la liberigo de la indiĝenoj, venis la vico de la afrikaj nigruloj, kies sklavigo komencis en la jaro 1680. Kaj la ideo pri la respublika formo, prilaborita de la jaro 1783, trovis en la lukto por la liberigo de la nigruloj kampon tre propran por sia malvolviĝo. La 13-an de majo 1888, la brazila registaro dekretis la liberigon de la nigruloj, kaj la 15-an de novembro 1889 estis proklamata la Brazila Respubliko.

Societoj Esperantistaj en Brazilio.

Brazila Ligo Esperantista. (B. L. E.) (1907). Rekonita de Publika Utleco (Dek. n. 4356, de 26. Oktobro 1921).

Grupoj aliĝintaj al „B. L. E.“:

1. Brazila Klubo „Esperanto“ (1906). Sidejo: Praça 15 de Novembro, 101. Rio de Janeiro.
2. Esperanta Klubo de Aracajú (1907). Sidejo: Aracajú. Sergipe.
3. Virina Klubo (1912). Sidejo: Rua General Severiano, n. 170. Rio de Janeiro.
4. Grupo Esperantista „Couto Fernandes“ (1914). Sidejo: Rua Collares Moreira, 116 S. Luiz. Maranhão.
5. Nova Samideanaro (1919). Rua Trietão Gonçalves, 246. Fortaleza. Ceará.
6. Esperantista Rondeto „Verda Stelo“ (1919). São Bonifácio. Correio de Teresópolis. S. Catharina.
7. Verda Stelaro (1920). Rua Paysandú, 781. Pelotas. Rio Grande do Sul.
8. Esperantista Grupo „Energio“ (1921). Instituto Historico e Geographico. Belém. Pará.

Aliaj Grupoj:

9. Pernambuka Esperanta Societo (1921). Rua Larga do Rosario, 216. Recife. Pernambuco.
10. Mossoró Esperanta Klubo (1921). Mossoró. Rio Grande do Norte.
11. Laborista Esperantista Grupo (1921). Rua do Senado, 61. Rio de Janeiro.

Informojn pri la Ekspozicio

donas nur al seriozaj interesatoj la Ekspozicia Komitato.

Adreso:

Comissão Executiva do Centenario,
Rio de Janeiro, Brazilio
Caixa Postal N-0 890.



Wien invitas la XVI-an.

Por interkonsiliĝi kaj decidi pri okazigo de tutmonda Esperanta kongreso en Vieno (Vieno), kunvokis la **Viena Deleĝitaro** t. e. elektita reprezentantaro de ĉiuj Vienaj Esperanto-societoj sabaton la 8-an de majo en la popola halo de la nova urbodomo grandan, publikan, amase vizititan popolkunveno. **Pli ol 1200 Esperantistoj kaj Esperantemuloj plenigis la kunvenejon;** la ministerio de publika instruado estis reprezentata per profesoro d-ro Zuck, la Teknika Akademio per la rektoro kortega konsilanto profesoro Schumann, la Aŭstria Societo por la Ligo de Nacioj per profesoro d-ro Longo, la Asocio de Viena Komercestaro per d-ro Weiss, la Viena Internacia Foiro per d-ro Blahy, la katolikaro per la provincialo de Piaristoj pastro Meštan (estinta redaktoro de „Espero Katolika“) kaj multaj aliaj. Post la malferma parolado de la sekretario de la deleĝitaro s-ano Sikor, kiu akcentis, ke per tiu ĉi unua granda popolkunveno la Viena Esperantistaro faras samtempe ankaŭ la unuan oficialan paŝon en la vastan publikan vivon, oni elektis profesoron d-ron Jokl kaj redaktoron Schröder kiel prezidantojn. Prof. Otto Simon de la Komerc Akademio prezentis post tio en verva kaj elokventa parolado la gravecon de Esperanta mondkongreso por Vieno kaj faris la proponon, aranĝi tiun kongreson en somero 1924. Post kiam direktoro Schamaneck, lektoro de Esperanto ĉe la Teknika Akademio, tralegis la koncernan rezolucion kaj la reprezentantoj de diversaj publikaj institucioj kaj organizaĵoj certigis la plej efikan akceladon por la sukceso de la kongreso, estis la rezolucio, okazigi en la jaro 1924 la **XVI-an Esperantan mondkongreson en Vieno, unuvoĉe akceptita.** El

la faritaj paroladoj speciale ankoraŭ menciindaj estas: la brila Esperanta parolado de prof. d-ro Jokl, ebliginta al la neesperantista ĉeestantaro ekkoni la belsoncon de nia lingvo, la parolado de s-o Borek, ĉefredaktoro de la ĉeĥa socialista ĵurnalo „Delnické Listy“ (Laborista Gazeto) pri la enkonduko de ĉiusemajna dukolona „Esperanta revuo“ en la dirita presorgano, la parolado de s-ano Kornmüller, sekretario de Aŭstria sekcio de Barbusse'a Internacio de eksmilitintoj kaj militaj viktimoj, plue la parolado de distrikta polic-inspektoro s-ano Stanislavsky pri la fondo kaj disvolvigo de polica Esperanta societo en Vieno kaj tiu de la reprezentanto de Vienaj tramvoĵistoj, kiu deklaris, ke la Esperanta movado inter la Viena tramvoĵistaro (17000 oficistoj kaj laboristoj) nun rapide disvastiĝas kaj la tramvoĵistaj samideanoj intencas samtempe kun la XVI-a kiel ĝian fakon kunvoki tiomondan kongreson de tramvoĵistoj. En la antaŭĉambrego de l' halo estis malfermita riĉa ekspozicio de Esperanta literaturo, modele aranĝita de la sindona kaj oferema s-ano Schade.

El ĉi-supraj sciigoj klare montriĝas, kun kiel granda seriozeco kaj respondeca sento la Viena Esperantistaro surprenas sur sin la efektivelon de la tasko, okazigi en sia urbo Esperantan mondkongreson. Ĉar estas jam preskaŭ certe, ke la sekvanta mondkongreso (1923) okazos en ia urbo de norda Italujo, Genova, Bologna aŭ Milano, la Viena Esperantistaro havas sufiĉe da tempo ne nur por inde prepari la kongreson mem, sed antaŭ ĉio per vasta kaj sistema propagando fari el Vieno, tiu laŭ sia situo, loĝantaro kaj popola anim-agordo plej internacia urbo de Eŭropo, ankoraŭ antaŭ la kongreso veran „alkastelon de Esperantujo“.

D-ro Emil Pfeffer.

Sudgermana Esperanto Kongreso. en Salzburg, Pasko 1922.

Bedaŭrinde nur nun, t. e. kvar semajnojn post la okazo de tiu ĉi kongreso, ni ricevis raporton pri ĝi. Komprenible la raporto jam ne estas aktuala kaj perdis multe de sia intereso. Tial ni nur en kelkaj linioj resumos ĝin.

Reprezentataj estis la aŭstraj grupoj Graz, Leoben, Salzburg, Vordernberg, Villach kaj Klagenfurt (bedaŭrinde nek Wien nek Linz nek Innsbruck) kaj la bavariaj grupoj Freilassing, Mühldorf, München, Reichenhall kaj Traunstein.

La malfermon de la kongreso en „Kaisersaal“ partoprenis diversaj lokaj aŭtoritatoj de lernejo, gazetaro ktp., kaj kiel eksterlanda gasto s-ano de Villa el Kuba.

La ekspozicion vizitis jam paskodimancojn ĉ. 8000 personoj; entute vizitis ĝin ĉirkaŭ 15000 scivolemuloj. Rezultoj: kurso estas aranĝota por instruistoj, kaj venontan lernejaron Esperanto estos instruata en burĝa lernejo.

La laborkunsidoj okazintaj dimanĉe pigm. kaj lunde atgm. decidis starigon de Interliga Oficejo de la Aŭstria Esp. Gruparo (adreso: Graz, Schulgasse 24) kaj konsilis al la grupoj aliĝi al GEA kaj aboni ties organon „Germana Esperantisto“. Plue oni decidis subvencion al UEA en Genève kaj CO en Paris, po membro 5 aŭstr. kron. (?) Laŭ propono de profesoro Christianell, Salzburg,

Kain kaj Abel.

La prasiento vekigadis. Ĝi etendis sin kun siaj nevideblaj membroj sur la tuta naturo kaj mire rigardis kun la enuokuloj tra la plumbokolora vualo de la aero, post kies griza nebulvizaĝo vidigis unu ruĝe fajreranta makulo — la suno.

Du viroj sidis kune sur deklivo de monteto. Ambaŭ estis perfekte similaj unu al alia kiel du ovoj. Ambaŭ estis tute nudaj kaj havis vizaĝon de prasimio Longaj brakoj pendis de larĝaj ŝultroj ĝis la genuoj, kaj krispaj haroj dense kovris la brustojn, dorsojn kaj la malsuprajn partojn de la membroj.

Ili sidis kun la muteco de la senkonscio. Unu el ili maĉadis frukton de lu arbo, laŭte suĉadante ĝian sukcon. Kun siaj senesprimemaj okuloj stulte palpebrumante li bestmaniere rigardis nur la rapide konsumiĝantan manĝaĵon. La alia observeme esploris ĉion ĉirkaŭ si kaj, rimarkante ion, tuj provis imiti ĝin.

Ĉirkaŭe kuŝis senfina praarbaro. Tra la densa branĉaro flugadis sopirĝemoj de naskiĝanta vivo. La kreskalero kantis melodion per muta senvorta voĉo, kaj mistika muziko de l' unua printempo susure akompanis ĝin. Kiel bele estas vivi! Ho, kiel bele!

Inter la laŭbkrono de lu arbo, ĉe la limo de l' arbaro, estis cikonia nesto. En ĝi ina cikonio silente kaj severmiene kovis, irapenerita de sia destino. Kelkajn minutojn jam ĝi sidis senmove, kiam fremda vircikonio alflugis la neston, kaj komenciĝis laŭta klaketado de bekoj. La vircikonio, ĉiam frapetante la aeron per siaj flugiloj ĉirkaŭflugadis, penante ricevi lokon apud la ino. Sed vane!

oni decidis rezolucion al la Aŭstra Ministerio por Instruado pri starigo de komisiono por Esperantistaj ekzamenoj.

Unua Tutpoluja Esperanto Kongreso.

La Akceptejoj.

La Organiza Komitato de la Unua Tutpola Esperanto-Kongreso komunikas, ke la kongresa Akceptejo funkcios sabaton, la 3. junio de 9 h. matene: ĉiu kongresano ricevos tie kongresajn dokumentojn kaj detalajn sciigojn pri la kongreso.

La adreso de la Akceptejo estas: Fotografiejo „Secession“, Marszalkowska 123, Warszawa.

La solena malfermo de la kongreso okazos sabaton, la 3. junio je 4 h. posttagmeze.

Provizora Pola Instituto de Esperanto.

La Instrua Sekcio de la Organiza Komitato decidis:

1. Fondi Polan Instituton de Esperanto, kies provizora estraro konsistas el la nunaj membroj de l' Instrua Sekcio.

2. Dum la I-a Tutpola Esp. Kongreso okazos ekzamenoj je instruistaj diplomoj.

3. La ekzamenoj konsistas el du partoj: a) publika (defendo de tezo); b) buŝa (publika aŭ privata).

Rimarko: Por defendi ĉiun tezon, la ekzameno ricevas nur 20 minutojn.

Je tiu laŭta klaketado alvenis neatendite la cikonedzo, kaj post mallonga batalo li forpelis la malagrablan amindumanton kaj poste okupis sian rajtan lokon en la nesto.

Iom post iom la klaketado ĉesis, sed la observeme kaŭranta viro salte levigis. La brakojn flugilmove svingante li penadis imiti la klaketadon de cikonioj.

„Klakla klaklakla klai!“

Ĉe la malsupro de la deklivo aperis nova homforma figuro. La koksoj larĝaj, la onde balanciĝanta irado tuj montris, ke tio estas virino. Molaj, silkaj harfokoj kovris la membrojn, kaj ŝia miemo estis multe pli senesprima ol tiu de la viroj.

„Klakla klaklakla“ ekkritis la viro, ekrigardinte ŝin, kaj per kaprosaltaj proksimiĝis al ŝi. Ŝi tuj kaŭris bestmaniere teren, kvarpiede, kaj tiel atendis lin. Inter ili komenciĝis ama ludo, simila al tiu de hundoj, kiuj gaje puŝetadas, mordetadas unu la alian dum printempa posttagmezo.

La batalo daŭris mallongan tempon, ĉar subite la virino rifuĝe kuris for de li, simile al ina talpo, kiu serĉas konvenan kaŝejon por defendi sin kontraŭ virtalpa atako dum pariĝa periodo. Sed la virtalpo superruzas kaj pelas ŝin en saktunelon.

La viro pelis ŝin, kaj ŝi rifuĝis. La spaco ĉiam pli kaj pli malvastiĝis, konsumiĝis inter ili, ĝis fine ŝi jetis sin teren, kapitulacis kaj cedis bestmaniere al la neevitebla amiĝado.

La alia viro indiferente, stulte palpebrumante, rigardis ilin. Sur liaj apenaŭ distingeblaj trajtoj vidigis nenia emocio, pasio, jaluzeco, sovaĝeco aŭ komprenemo. Nur laŭte suĉadante la fruktosukon, li miris pri ili kun felica nescio.

4. Enskribiĝi por la ekzamenoj oni povas ne pli frue ol 2 semajnojn antaŭ la ekzameno.

5. Kiel dato de l' publikaj ekzamenoj estas fiksita sabato (3. VI. 22) je 8 h. vespere (pri privataj ekzamenoj fiksos la ekz. komisiono).

6. La prezidon de l' Komisiono havas s-o d-ro Leono Zamenhof.

7. Ĉiu ekzameno devas deponi 2 tezojn, kiujn li povas elekti el la listo de tezoj fiksita de l' Instituto de Esperanto, sed devas ricevi je ili specialan aprobon de l' Komisiono. La tezoj estas: a) historia, b) literatura.

8. Ĉiu ekzameno pagas kotizon: 1000 mk. por instruista ekzameno, 500 mk. por ekzameno pri lingva kapableco.

Detalajn informojn donas skribe la gvidanto de l' Instrua Sekcio, s-o Edvardo Lonkopolanski (adr.: Varsovio, Biala 3).

La tezoj estas jenaj:

I. Historiaj:

1. Konciza historio de ĉiuj projektoj de lingvo internacia.

2. La Esperantista movado dum la milito.

3. La tendenco al internacia organizaĵo en la his orio de Esperanto.

4. Esperanto en la praktika vivo (kun speciala substreko de la lastaj sukcesoj, precipe en lernejoj).

5. Konciza biografio de D-ro L. L. Zamenhof.

II. Literaturaj:

1. Kompari la stilon de tri famaj prozajlistoj.

2. La signifo de afiksaj en Esperanto.

3. Bibliografio kaj kritiko de l' verkoj, aperintaj dum la milito.

4. La diversmanieraj instruisistemoj de Esp.

5. Esperanto — disvastigilo de naciaj literaturperloj en la mondo.

Postkongresa Vizito en Kopenhago,

la 21-an kaj la 22-an de aŭgusto 1922.

Certe multaj samideanoj, kiuj preterpasos Kopenhagon post la vizito ĉe la universala kongreso en Finnlando, volos uzi la okazon resti en la dana ĉefurbo dum kelkaj tagoj. Tial „Centra Dana Esperantista Ligo“ aranĝos en Kopenhago, la 21-an kaj la 22-an de aŭgusto, dutagan kuneston kun la enlandaj kaj eksterlandaj samideanoj, kiuj partoprenis la Helsingforsan (8.—16. aŭg.) kaj la Stockholman (18.—19. aŭg.) kongresojn.

La kongreskarto, havebla ĉe f-ino Astrid Rybo, Kommuneskolen ved Sundholm, Kopenhago, S, kostas: 5 dan. kr. por svedoj, norvegoj, danoj, svisoj, francoj, belgoj, britaj imperianoj, holandanoj, hispanoj, italoj kaj usonanoj; 2 dan. kr. por finnoj, germanoj, litovoj, ĉeĥoslovakoj, rumanoj, bulgarioj, grekoj kaj jugoslavoj; 1 dan. kr. por estonoj, poloj, aŭstroj, hungaroj kaj latvoj. Bonvolu sendi la kotizon per ĉeko.

Provizora Programo:

Lundo, 21. aŭgusto.

Antaŭtagmeze renkontiĝo ĉe Langellinte, unu el la plej belaj promenejoj en Eŭropo, laŭlonge de „la sundo“: en la konata restoracio ĉe la maro oni matenmanĝos, ĝuante la bonan danan buterpanon. Poste oni (ebte per aŭtomobila karavano), rigardos la urbon, la ĉefstratojn kaj iliajn konstruaĵojn, ekzemple la urbdomon, la rondan turon, diversajn palacojn, la borson, la reĝan teatron ktp. Vespele komuna manĝado kun sekvantaj amuzoj kaj dancado.

Ili sidis tri kune sur la deklivo en ombro de antaŭen etendiĝanta branĉo. Inter la du viroj kaŭris ŝi. Ili silentis kun natura muteco kaj observeme rigardadis ĉirkaŭen.

La unua viro kun iom da scivolemo denove vizitis per sia rigardo la cikonian neston, el kiu flugis for malproksimen la cikonedzo.

La dua, kune kun ŝi, vigle atentis pri ludoj de simila familio, kies membroj malgracie saltante fl-dancis ĉirkaŭ la sola ino. Unu post alia la vircikonio jetis sin al la abomeninde rikananta simlino. . . . La kaŭrantaj viroj kaj virino pli proksimen tiris sin unu al alia pro vekiga instinkto.

Laŭta klaketado aŭdiĝis. La impertinenta amindumanto denove kuraĝis flugi al la nesto kaj persiste atakis la sin defendantan inon, ĝis alvenis la cikonedzo. La pli frua batalo ripetiĝis, sed la atento de l' observanta viro aliiris alia okazantaĵo.

Ega boao ŝtelire serpentumis al la ina simio, kiu terurite provis rifuĝi. Unu el la vircikonioj, forta kaj muskolhava, per siaj svingantaj manoj, hazarda rompis dikan branĉon de apuda arbo kaj klopodis forpeli per ĝi la danĝeran vizitanton. Dum la batalo raŭka forta blekado eliĝis el la gorgo de la simio kaj la blankaj dentoj grincis en ĝiaj makzeloj. Ekstreme terura estis ĝia aspekto. „Aoa! Ohaol!“ imitis la viro la blekadon kaj ĉiun movon de l' simio. Li plenblovis sian bruston, turnadis la okulojn kaj grincigis la dentojn.

En la sama momento ankaŭ la batalo finiĝis inter la du vircikonioj, kaj la venkinta edzo triumfe klaketadis ĉe l' rando de la nesto.

Sovaĝaj inklinoj vekigis en lia senkonscia animo kaj, ĉirkaŭrigardante, li ekvidis apud si la alian viron, kiu volupteme tenis la virinon ĉe si.

Mardo, 22. aŭgusto.

Tagmeze ekskurso al la banloko „Skodsborg“, proksime de Kopenhago, kie oni pasigos kelkajn horojn en la fagarbaro kaj ĉe la marbordo.

Vespele la kongresanoj kolektiĝos en la amuzejo „Tivoli“, kiu estas mondfama, eĉ unika establaĵo; kaj tial ne sen kaŭzo skribas Barono de Méné en „La Revuo“ 1908: „La famo de tiu ĝardeno ne estas trograndiĝita; ĉio, kio povas amuzi la homojn, sin trovas en tiu agrabla loko. . .“. Jes, estas vero, ĉar troviĝas tie: Grandega simfoniorkestro, teatro kaj revuoj, bonegaj restoracioj, glifervojoj sur artaj rokoj, ĉiusecaj popularaj amuzajoj, superbaj artfajraĵoj, grandiozaj iluminacioj ktp. La tuta Kopenhago sen diversigo de rango renkontiĝas dum la vespero en „Tivoli“, kiu ĉe siaj grandaj festoj povas kalkuli ĉ. 50000 da gastoj.

* * *

Kopenhago, kiun oni nomas „La urbo kun la belaj turoj“, estas konata kiel ĝoliga kaj belaspekta urbo. Ĝi estas sufiĉe malnova, sed la plej multaj kvartaloj estas nun renovigitaj, tiel ke oni ne bezonas timi, ke ne regas en la „Norda Atheno“ la pureco de la „malnovaj Grekoj“. Do, karaj samideanoj venu multnombre al nia modesta kongreso, por kies sukceso ni Kopenhagaj Esperantistoj faros nian plej eblan.

Martin Blicher,
Prezidanto de
Centra Dana Esperantista
Ligo.

Astrid Rybo,
Membro de la
Loka Kongresa Komitato
de C. D. E. L.

Komercio.

Komerca Ĉambro kaj „Sfatul Negustoresc“ en Cluj por Esperanto.

Ni jam komunikis kelkajn poresperantajn decidojn de la Komerca kaj Industria Ĉambro de Cluj (Kolozsvár) en Transilvanio, Rumanio. En marto nunjara la Ĉambro kune kun la t. n. „Sfatul Negustoresc“ (komercista asocio) aranĝis kursojn por komercistoj kaj metlistoj. La daŭran interesiĝon kaj favoron de l' nomitaj du institucioj por Esperanto elokvente pravas la fakto, ke ili ambaŭ sendis delegiton al la Esp. Konferenco de Genevo en la persono de s-o Andreo Ce.

La Disvastiĝo de ET.

Je 21. marto 1922 en la landoj:

Germana 324, Pola 256, Ĉeĥoslovaka 240, Nederlando 168, Hispana 155, Aŭstra 153, Svisia 140, Finna 131, Belga 130, Rumana 127, Angla 109, Estona 94, Franca 89, Hungara 85, Italia 72, Sveda 68, Rusa 67, Bulgara 63, Sibera 50, Litova 43, Japana 36, Usona 32, Jugoslava 25, Latva 24, Dana 23, Argentina 18, Norvega 7, Brazilia 6, Danzig, Kanada po 5, Aŭstralio, Fiume po 4, Islando, Ukraina po 3, Irlando, Turka, Brita Okcidenta Hinda, Urugva po 2, Transvala, Maroka, Egipta, Palestina, Georgia, Nederl. Hinda, Burma, Meksika, Kuba, Venezuela, Panama, Brita Kolumbia po 1. — Krome 430 poŝtabonantoj.

Entute 3219, el kiuj ĉ. 3000 estas pagataj. 882 estas abonataj rekte ĉe la administrarejo, 430 estas abonataj ĉe la poŝto kaj 1897 estas vendataj de gazetvendistoj, de societoj aŭ de propagandistoj.

Oni vidas, ke la pli grandan nombron formas la malbonvalutaj abonantoj: estas ĉ. 1750, do pli ol la duono.

En tiu momento el lia gorgo, eksplodis forta akra „o a o“ krio. Liaj nazloboj tremetadis, sengo rugigis la vejnetojn de liaj okuloj, minace vidigis la blankaj dentoj inter la lipoj, kaj li rompis etendiĝantan branĉon de arbo. Ĝin ronde svingante li kuris al li kun aeronskuanta blekado kaj per unu bato mortigis sian homfraton, kiu senkrie tuj terenfalis.

Post la mortigo li triumfe iris imiti la klaketadon de la vircikonio, dum la brakojn li movis kvazaŭ flugilojn, jen penis vekti la kadavron, kies senmoveco estis tute nova al li, jen kun stranga scivolemo rigardis la sangon, disfluantan el la kranio, ĝis fine, pri ĉio forgesante, li ekvidis apud la mireganta virino.

Tiamaniere mortigis Kain sian fraton Abel.

Julio Baghy.

Humoro.

Post la ĝeneva konferenco.

Joĉjo, Esperantisto 10-jara, ĵus reveninte el la lernejo, tuj kaptas kuŝantan sur la patra skribotablo numeron de „Esperanto Triumfonta“ kaj fervore ekstudas ĝin (t. e. ĝiajn ilustraĵojn).

Post kelkaj momentoj envenas lia „samideano“-patro.

„Ĉu ci frenezigiĝis, John?! Ci ankoraŭ ne el-tornistrigis ĉiajn lernolibrojn kaj jam legas gazeton?“

„Ĉu ci ne legis, paĉjo, ke antaŭ ol studi francan lingvon, profesoro Bover rekomendis Esperanton? Kaj por morgaŭ mi devas lerni nur francan.“

Krakurbano.

Varbu abonantojn por ET!

Internacia Teknika Asocio (ITA).

En nia artikolo en ET de 12. marto ni faris alvokon al teknikistoj el diversaj landoj, kiuj lernis Esperanton, por ke ili kiel praktikaj personoj komencu praktikan publikan eksperimenton, apliki Esperanton al praktika celo. Respondis ĝis nun 16 personoj el 8 landoj. Nature tio ĉi ne sufiĉas por krei ITA, sed tamen povas esti per la helpo de ET la unua kerno de la nova asocio. Necesas marŝi antaŭen, sed prudente. Ĝis kiam ni ne havos 500 aliĝantoj promesintaj pagi jare almenaŭ po 50 liroj, aŭ egvalvaloron laŭ la landa valuto, ni ne povas pensi fondi asocion kaj eldoni revuon.

Tial ni nun daŭrigas nian preparan laboron per la helpo de ET, de Scienca Revuo kaj de aliaj Esperantaj gazetoj, kiuj volos helpi al serioza praktika aplikado de helpa lingvo. Certe inter la legantoj de ET estas ankoraŭ pli da teknikistoj, kiuj povas aliĝi, kaj multaj aliaj estas inter la legantoj de aliaj Esperantaj gazetoj, tial ni devas peti, ke ĉiuj gazetoj Esperante skribitaj bonvolu represi nian alvokon, por ke teknikistoj el diversaj landoj sendu sian aliĝon al nia adreso.

Kiel ni diris en la antaŭa artikolo, necesas, ke ni konigu la unuajn kun la aliaj; tial estas necese, antaŭ ĉio, ke ni interŝanĝu nian vizitkarton. Mi funkcios kiel provizora sekretario kaj respondos sole per la gazeto. Do aliĝis ĝis nun la sekvantaj s-oj:

- Anglujo:
John A. Calvert, ing. arkitekto, Shouhend-on-Sea.
Belgujo:
Axel Baesens, kemistaro, Malines.
Francujo:
Richard E. H. Levin, kemistaro, St. Jons (Rhône).
Finnlando:
Ilmari Ekström, elektro-ingeniero, Åbo.
Mattil Dahlström, elektroteknikisto, Viipuri.
Germanujo:
Hubert Faber, direktoro de fabrikejo por ladaĵoj, Stolberg (Rhd.).
Rud. Karl Brakel, ingeniero, Köln-Nippes.
Italujo:
D-ro Alfred Stromboli, elektrometalurgisto, Torino.
Polujo:
J. G. Teichfeld, ingeniero, Varsovio.
Stefano Kapota, arkitekto, Varsovio.
D-ro Emiljan Loth, ing. kemistaro, Sochaczew.
K. Mikolajczyk, ingeniero, Lodz.
A. Ellmann, industria inspektoro, Poznan.
Pati Davo, teknikisto (teksarto), Lodz.
Rusujo:
Georgo Svislunov, ing. mekanikisto, Saratov.
Josefo Karantabajvel, teknikisto-konstruisto, Moskvo.

Se ni do povas kolekti 500 personojn pagantajn almenaŭ 50 lirojn aŭ saman valoron, ni povos dungi sekretarion salajritan per almenaŭ 1000 liroj po monato kaj eldoni podomonate teknikan revuon. Kiam ni atingos 1000 membrojn,

ni eldonos la revuon monate. Ni do devas bone organizi la aferon sur financa bazo kaj sen tro da iuzioj.

Enkonduki Esperanton en internaciaj kongresoj estas sonĝo. Tro da diversaj lingvoj oni jam parolas, kaj la plej multaj el la kongresanoj, kvankam ili bone komprenas la utilecon de helpa lingvo, ne akceptis ĝin. Ni do devas iri alian vojon. Ni, kiuj jam konas Esperanton, komencu kongresi fakte kaj internacie, ni diskonigu la praktikan eksperimenton kaj iru antaŭen serioze, la aliaj sekvos. Pli ol ĉiuj eblaj propagandaj asocioj Esperanto bezonas librojn por ĝin lerni, kursojn por helpi al la lernado, kaj praktikajn aplikadojn. Ni teknikistoj kiel praktikaj personoj estu la unuaj, kiuj uzas ĝin praktike, kaj montru la vojon. Ne estas eble serioze kongresi por la ajn fako dum la universala kongreso. Ili estas festo jara de la Esperantanoj, sed apartaj kaj aliloke organizitaj fakaj kongresoj estu la praktika serioza aplikado de helpa lingvo Esperanto.

Ni do pripensu, ĉu dum la venonta jaro, ĉu dum la jaro 1924 teknikistoj povos sin renkonti en Torino por serioze kongresi pri la diversaj teknikaj internaciaj problemoj.

Torino 5, Via Verzuoli 48.

D-ro Alfredo Stromboli.

Foiroj kaj Ekspozicioj okazontaj dum junio 1922.

28. majo ĝis 5. junio. Praha. Int. Spec. Foiro.
1.—15. junio. Padova. IV-a Int. Spec. Foiro.
3.—15. Zagreb. Int. Spec. Foiro.
9. Buenos Aires. Int. Ekspozicio.
15. Dresden. Germ Ekspozicio de keramiko kaj vitraĵoj.
15.—24. Birmingham. Int. Ekspozicio de fandaĵoj.
15.—30. Bordeaux. VI-a Int. Spec. Foiro. Vinfolio. Ekspozicio de inventaĵoj.
18.—26. Fredericia (Danujo). Spec. Foiro.
19.—23. London. Ekspozicio de drogoj kaj farmaciaĵoj.
22.—27. Nürnberg. Migranta Ekspozicio de la Germ. Agrikultura Asocio.
24. Bourges. Foiro-Ekspozicio.
Krome okazos dum junio internacia foiro en Lisboa kaj foiro-ekspozicio en Alger.

Al ĉiulandaj studentoj.

Multaj demandoj, kiuj estas gravaj por nia internacia interrilatiĝo, ankoraŭ restas ne aranĝitaj post la ĝojiga komenco en tiu rilato farita en Praha. Ni finnlandaj studentoj-Esperantistoj atendas la XIV-an Kongreson en la certa espero, ke tiam ankaŭ la Esperantista studentaro povos pli certe difini la direktivajn de la estonta internacia agado. Ni atendas ĉi tien grandegan nombron da eksterlandaj gekolegaj kaj promesas aranĝi ĉion tiel oportune, kiel la nunaj cirkonstancoj permesas. Ni kredas, ke nin multe helpas ĉe tiu aranĝado tio, ke la Finnlanda studentaro rajtigis Studentan Esperantistan Societon en Hel-

sinki reprezenti ĝin antaŭ la eksterlandaj studentgastoj Esperantistaj.

En nomo de la tuta Finnlanda studentaro ni do invitas gekolegajn el ĉiuj landoj multnombro partopreni en la studenta faka kunveno, kiun la Studenta Esperantista Societo en Helsinko aranĝos dum la XIV-a Kongreso de Esperanto.

Pli detalajn informojn pri la tempo kaj loko ni donos pli poste.

Ĉiujn demandojn, kiuj koncernas la fakan kunvenon, raportojn pri la demandoj diskutitaj kaj aliĝojn oni sendu al med. kand. L. I. Lappi je la adreso de la Loka Kongresa Komitato.

Studenta Esperantista Societo
Helsinki-Helsingfors.

Mallongaj Esp. Sciigoj.

La I-a Tutrespublika Esp. Kongreso en Ĉeĥoslovakio okazos la 10. junio en Brno (Brünn).

En Sl. Ostrava, Ĉsl.

s-o Kubala finis kurson kun 49 personoj. — En Hulvadky apud Ostrava skoltoj aranĝis paroladon pri Esperanto. Klarigis s-o Janečka el Vitkovice kaj komencis kurson la 7. majo.

La franca kongreso en Béziers ne okazos pro sekvo de neantaŭviditaj cirkonstancoj; ĝi estas anstataŭigota de ĝenerala kunveno de la Societo Franca por Propagando de Esperanto, okazonta la 4.—5. junio en Paris. (Laŭ ĉirkulero de S. F. P. E.)

La II-a kongreso de la francaj revoluciemaj Esperantistoj

okazos en Troyes (Aube) la 4.—5. junio. La kongreson aranĝas la laborista grupo de Troyes "Liberiga Stelo", kiu havas 95 membrojn. La kunveno okazos en la Laborborso ĉe la sidejo de la grupo. La delegitoj kaj ĉiuj membroj de la Federacio sendu sian adresojn kaj aliĝojn al s-o Cap René, 32, rue aux Moines, Troyes (Aube).

En Clermont-Ferrand, Franc.

fondiĝis nova grupo "Konkordo"; prez. s-o Isaru, licea eksprofesoro.

Nord-Orienta Federacio de Anglio

havis sian kvaronjaran konferencon sabaton la 29. aprilo en WallSEND. La konferenco montris, ke Esperanto vigle progresas en Nord-Anglio. Kurso baldaŭ okazos en Jarrow, grupo fondiĝis en Bedlington.

En Sieradz, Polujo

fondiĝis Esp. rondo kun 12 anoj. Leterojn direktu al la sekretario s-o Jozefo Stulman, Sieradz, Polujo.

Enketo pri Sonoril-Arto.

La 12.—15. aŭgusto okazos en Mechelen (Malines) internacia ekspozicio kaj kongreso de sonoril-arto kaj historio de sonorilaroj. La subskribinto estus tre dankema al ĉiu Esperantisto, kiu respondus al sekvanta demando:

1. Ĉu ekzistas en via urbo ludita aŭ ludata sonorilaro?

2. Ĉu da sonoriloj ĝi enhavas?

3. Ĉu pezas la aro de la sonoriloj? Ĉu la plej peza sonorilo?

4. Ĉu ĝi estas aŭ estis ludata de sonorilaristo (pagata de la urbo) aŭ per maŝino?

5. Ĉu la sonorilaro aŭdigas koncertojn (sekvon de diversaj muzikaj)? Ĉu aŭ je kiaj okazoj?

Axel Baesens, Staliestraat 16, Mechelen (Belg.).

Gazetaro.

Esperanto en la gazetoj de Wien.

El Wien ne ricevis denove tutan pakadon de gazetoj: 57 artikoloj pri Esperanto aperis de 20. aprilo ĝis 15. majo en la Viena gazetaro. Certe imitinda ekzemplo por aliaj urboj! La gazetoj, kiuj en la dirita tempo raportis pri la konferenco de Genève, pri Esp. kongreso 1922 en Wien k. a., estas la sekvantaj: Wiener Allgemeine Zeitung, Arbeiter-Zeitung, Delnické Listy, Der Abend, Die Rote Fahne, Hammer und Nagel, Extrablatt, Der Licht-Bringer, Mittags-Zeitung, Morgen-Zeitung, Freie Presse, Neues Wiener Journal, Oeffentliche Sicherheit (Art.: Esp. en la servo de la polico), Reichspost, Volks-Zeitung, Neugigkeits-Weltblatt, Wiener Bilder (ilustr. revuo, kun ilustraĵo pri la konferenco en Genève), Wiener Zeitung.

Alllanda gazetaro.

Les Echos, grava eksporta gazeto, ĉs., Paris, 17. 5. (En ĉefartikolo pri la rutino en la komerc, la direktoro favore parolas pri Esp. — Raporto pri la konferenco de Genève.)
Le Petit Financier, Paris, 20. 5. (Favora art.)
La République de l'Oise, Beauvais, 16. 5. (Respondo al malfavora art. de s-o Demarcy.)
La Bataille Syndicaliste, Paris, 18. 5. (La lingvo internacia: kelkaj faktoj.)
L'Hérault, Béziers, 5. 5. (Art. pri Esp. konferenco en Genève.)
Le Petit Biterrois, Béziers, 4. 5. (Artikolo.)
Le Petit Méridional, Béziers, 4. 5. (Pri Genève.)
L'Eclair, Béziers, 4. 5. (Pri Genève.)
Unser Volk, Krefeld, Germ., 21. 5. (Esp. angulo.)
Neue Berner Zeitung, Bern, 19. 5. (Art. "Esp. kaj Ligo de Nacioj", de Th. R. Studer.)
Eugenia, Barcelona, majo. (Art. "La Kaverno de Zarathustra", trad. el "Sennaclega Revuo".)
Nieuwe Hangelosche Courant, Hengelo, Nederl., 5. 5. menciis resumon pri foiro en Leipzig laŭ sendita ilustr. Esp. katalogo.

Nekrologio.

La 14. majo mortis nia kara grupano

Otto Schlobach

30-jara Pro sia fervoro por Esperanto kaj sia persona amindeco li restas neforgesebla al ĉiuj gegrupanoj.

Esp. Grupo "Jadegolfo"
Wilhelmshaven-Rüstringen.

La Interŝanĝo

Franca kaj Esperanta revuo ilustrita por korespondantoj, interŝanĝoj kaj komercaj interrilatoj aperas sep fojojn jare, estas 32- aŭ 40-paĝa, ne enkalkulante la liston de la aliĝantoj sendatan nur al la abonintoj.

Jara abonprezo: 10 francaj frankoj.
Specimena n-o: 1 franca franko aŭ 4 respond-kuponoj.

A. Bonnefous, Direktoro, Béziers (Hérault), Francujo, 3, rue du Capus, et 22, rue Viennet.

Nederlanda Anonima Societo
Luksa-pano Fabrikoj
antaŭe Henri J. Carels.
50 Buikoj:
Den Haag, Haarlem, Amsterdam.
Luntejo Carels
(ĉefo: H. A. Scherwächter)
63 Weimarstraat, Den Haag.
Oni parolas Esperanton.

Nederlanda Esperanta Komerco-Oficejo
(Nederlandsch Esperanto-Handelsbureau)
Diergaardelaan 64, Rotterdam (Hollando)

Tradukas ĉirkulerojn, komercajn leterojn ktp. el Esperanto en nederlandan lingvon, kaj sin ŝarĝas per la dissendo de ĉirkuleroj.
Prokuras komercajn adresojn.
Prizorgas la anoncedon en Nederlando.
Interrilatiĝas kun nederlandaj komercistoj kaj industriistoj.
Sciigas la kurzojn de valuto kaj valorpaperoj.

Du samideanoj deziras tujmondajn gekorespondantojn. Adresoj: Hans Graf, Mittellangenu n-o 48, bei Hohenelbe; Josef Funk, Hohenelbe n-o 157, Ĉeĥoslovakio.

Kapital-Partoprenanto
por pilgrandigo de profitportanta senkonkurenca entrepreno
ĝis Mk. 200 000.
serĉata. Bonaj referencoj. Proponu al
Esperanto Komerclista Grupo Dresden-N.

Nia nova Esperanta ofertilo aperis. Postulu ĝin tuj! Ni perdas ĉiujn negocojn. Filioj en Saaz kaj Barcelona.

Oni postulu la "Victoria"-Ekspost-Prezilston

en germana-hispana aŭ germana-angla lingvoj.

Abonejoj de ET
en la landoj

Aŭstra: Ferd. P. Huber, Münchsberg 5, Salzburg; por Wien "La Esperantisto" (d-ro E. Pfeffer), Wien II/1, Postami 54
Belga: Frans Schoofs, 48, Kl. Beersstraat, Antwerpen. Poŝt-ĉeka n-o 284 20.
Bulgara: Georgi Ŝr. Gaŝevski, Bul. Marie Luiza 46, Sofia
Ĉeĥoslovaka: Otto Sklenčka, Hradec Kralové. Otto Lumpe, Trautenau.
Estona: Est. Esp. Unuiĝo, postkasti 6, Tallinn.
Finna: O/Y. Movado A/B., Kasarminkatu 20, Helsinki.
Franca: Esp. Centre Librejo, 51 rue de Clichy, Paris 9.
Hispana: Konrado Doménech, Caldes de Malavella, prov. Girona, Vichy Catalan.
Hungara: Pabŭlo Balkanyi, Hajoa-utca 15-II-2, Budapest VI.
Japana: Morizo Ga, 16-V, Kitamači, Aojama, Tokio.
Jugoslava: D-ro Dušan Maruzzi, Zagreb, Jezuitska ul., br. 1.

Litova: Paŭlo v. Medem, Smellu g-ve 12, Kaunas (Kovno).
Pola: Adolfo Oberrotman, Krak-Przedm. 10, Warszawa. (P. K. O. n-o 5125). — Pola Esp. Servo (Fr. Prengel), Kordeckiego 1a, Bydgoszcz-Bromberg.
Rumana: Esperanto-Oficejo Cluj.
Sveda: Förlagsföreningen Esperanto, u. p. a., Stockholm 1 U. S. A.: The Esperanto Service Corporation, 800 Fifth Avenue, New York City.

Anoncetoj.

Familiaj anoncetoj senpage. Aliaj anoncetoj (nur akceptataj por minimume du sinekvej enpresoj) kostas po du enpresoj kaj po 20 vortoj 0.90 dol., 0.60 fl., 1 nord. kr., 1 ŝil., 1 svia. fl., 1 pes., 2 franc. aŭ belg. fl., 5 lir., 7 fmk., 8 kc., 30 mk., 75 hung. kr., 500 pmk., 500 austr. kr., internacie 5 e'amp. resp.-kup.; ĉe rektaj abonantoj ni deprenas la pagon por anoncetoj laŭdezire de la abonkonto, de aliaj ni enpresas anoncetojn nur post antaŭpago. — Anoncetoj devas elveni 10 tagojn antaŭ publikigo.

NASKIĜO. Al ges-anoj Rudolf Strauss, del. de UEA, Halle, Germ., Scharrenstr. 10, naskiĝis filino nomita Lotte, la 17. majo 1922.

NASKIĜO. Al ges-anoj Friedrich Döppe, Halle a. S., Germ., Landbergerstr. 11, naskiĝis filo nomita Friedrich la 8. majo.

GERMANA FRAŬLINO el Ĉeĥoslovakujo, instruitino por franca kaj angla lingvoj, muzikema kaj fervora Esperantistino, serĉas postenon en Anglujo aŭ Francujo dum la libertempo (julio-aŭgusto, ebl. septembro). Ĝesam-ideanoj estas petataj atentigi pri kvalifikaj pozicioj (ankaŭ el naciaj gazetoj). Proponojn bonvolu direkti al s-ino Therese Melzer, Hohenelbe 155, Ĉeĥoslovakujo.

SIGELMARKOJN Esperantajn, insignojn, kaŭĉukajn stampilojn por societoj, poŝtkartojn liveras tuj Jozefo Kocourek, gravuristo, Wien X, Arthaberplatz 8-14. Oni korespondas en lingvoj: ĉeĥa, germana, rusa kaj Esperanta. Postulu specimaron de Esperantaj sigelmorkoj kontraŭ 2 respond-kuponoj.

MINISTERIO POR INSTRUADO EN POLLANDO ordonis, ke ĉiu 14-jara lerneano devas jam legi "Sinloron Tadeon" de Mickiewicz. Hontu, ke vi ĝin ankoraŭ ne posedas en la perfekta traduko de A. Grabowski. Kun rekomendita alsendo 155 gmk. pagotaj aŭ rekte aŭ al Leipzig poŝtĉekkonto n-o 89775. — Eldonejo "Esperantista Voĉo", Jaslo, Pollando. — KRIJOJ De L' KORO, de Salo Grenkamp, frankite nur 8 gmk., ricevebla ĉe supra eldonejo.

ESPERANTAJ INSIGNOJ. Sendu al mi 0,50 fl., kaj vi ricevos belan insignon. Adreso: "Esperanto-Domo", 25, I., M. H. Trompsstraat, Amsterdam, Hollando.

P. MEDEM, Kaunas, Litovujo, forveturante pro malsano, eksterlandan, esperas reveni fine de julio kaj petas partopreni la korespondadon ĝis aŭgusto.

NEDERLANDANOJ! S-o M. L. Schoop el Zürich parolados ĉe Universitato en Delft la 3. junio pri progresoj de metaliza tekniko kaj samtempe pri la utilo uzi Esperanton en la rilatoj kun eksterlandaj firmoj.

Korespondo kaj Interŝanĝo.
Filatelistoj, kiuj sendas al mi 50 aŭ 100 poŝtmarkojn de sia lando, ricevos la saman kvanton de mia lando kaj aliajn de Suda Ameriko. — Eŭropo, Azio dum la milito. — F. R. Varela, San Francisco 824, Buenos Aires, Argentina Respubliko.

Mi deziras korespondantojn Esperantistajn de ĉiuj patrujoj, sen temoj de specialaj konversacioj. — F-ino Henriette Palandre, 1, Montée du Mont Sauvage, "Croix Rousse", Lyon, Francujo.

S-o Lazaro Abramoviĉ, Bahmu, Ukrainio, Ruslando, Ĉarkovskaja 65, deziras korespondi per leteroj, poŝtkartoj kaj poŝtkarto illustritaj (bfl) kun ĉiuj landoj.

Maurice Jaumotte, lingvoprofeso, 79 Rue St. Laurent, Antwerpen, Belgujo, deziras rilatojn kun ĉiulandaj apartaj gesperantistoj por organizo de manuskriba rondira gazeto.

S-o Josef Kuttelwascher, Wien XV, Gersnerstr. 3, II., pordo 7, serĉas interrilatojn nur kun seriozaj poŝtmark-kolektoj en ĉiuj landoj.

S-o C. Haas, Welmarstraat n-o 346 a, den Haag, Hollando, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun la tuta mondo.

Pelucchi (Esperanto Studenta Asocio), str. Settembrini n-o 5, Milano 29, Italujo. — Esperantistoj! Fondiĝis nova kaj unika Esp. Stud. Asocio, kiu deziras havi vigan korespondadon kun alilandaj Esperantistoj; interŝanĝas ankaŭ ĉiam kaj tre volonte poŝtmarkojn, poŝtkartojn ilustr., librojn, gazetojn, Esperantajn.

Redaktoro Werner Odegård, Hudikavall, Svedujo, deziras korespondi kaj interŝanĝi 500-litajn kaj Esp. journalojn kun Esperantistoj en aliaj landoj, precipe journalistoj kaj gebontemplanoj.

S-o Jakob Alfred Persson, n-o 8, Svensköp, Svedujo, deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustr. (kuriozaĵoj), leterojn, foto-grafetojn kaj monerojn kun ĉiuj landoj.

Eld. korp. 491, Charles Peterson, H. M. "Wachtmeister", Karlskrona, Svedujo, deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtkartojn ilustr., amator-fotografajojn kaj poŝtmarkojn, prefere kun ĝardenistoj ĉiulandaj.

S-o Sinclair Söderberg, P. I. 165, Norrahammar, Svedujo, deziras korespondi por ekzercadi Esperanton.

Karlskrona, Svedujo, Enoch Anderberg, H. Allm Läröverket, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun la tuta mondo. Havas multajn malsamajn svedajn poŝtmarkojn.

S-o B. Kofman, ul. Lipowa 48 b, Białystok, Poljo, deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustritajn, poŝtmarkojn kaj aliajn aĵojn.

Aleksandro Birtlier, telegrafa mekanikisto, Teiuș, Rumanio, deziras korespondi por ilustr. poŝtkartoj kaj leteroj. Mi estas amator-fotografisto, mi interŝanĝas diversajn foto-grafajojn.

S-o Ludoviko Fodor, juristo, Arad-Chișineu, Transilvanio, Rumanio, deziras interŝanĝi ilustr. poŝtkartojn kun ĉiuj landoj.

S-o F. Schramm, Zittau, Marschnerstr. 5 b, Saksujo, Germ., deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustr. (bfl.) kun ĉiuj landoj, ankaŭ Esp. gazetojn.

S-o Friedrich Döppe, Halle a. S., Germ., Landbergerstr. 11, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj.

Bruno Franowski, Brunnenstr. 8, Berlin, Germ., deziras interŝanĝi original-fotografajojn (pejzaĝojn, tipojn) de la tuta mondo. Mi resendos tiom, kiom mi ricevos.

Otto Tesch, Grosse Hamburgerstr. 2, Berlin, Germ., deziras interŝanĝi poŝtkartojn nur kun vidaĵoj de teatroj el ĉiuj landoj.

S-o Max Pompe, Lodz, str. Piotrkowska 259, Pollando, deziras korespondi kun la tuta mondo per poŝtkartoj kaj leteroj.

S-o Reinhold Wagner, Lodz, str. Gliwna 18, Pollando, deziras korespondi kun la tuta mondo per poŝtkartoj kaj leteroj kaj interŝanĝi poŝtmarkojn.